5-a IVU - Internacia Vintra Universitato

Internacia Vintra Universitato (IVU) festas en Xanten sian 5-jaran datrevenon. IVU estas la vintra ekvivalento de la Internacia Kongresa Universitato (IKU), kiu antaŭe nomiĝis Internacia Somera Universitato (ISU). Ĝi unuafoje okazis en 2007 dum la IF en Düsseldorf, ree en 2008 samloke, kaj sekve dufoje en Nördlingen. IVU samtempe estas studadsesio de AIS (same kiel estas IKU-AIS ekde 1995). La ĉi-jara elekto de IVU konsistas el mia tradicia kurso de Astronomio, ĉi-jare pri foraj planedoj de aliaj sunsistemoj), kun praktika parto - teleskopa observado de Jupitero kaj ĝiaj kvar galileaj lunoj. Kristin prelegos pri du popoloj disigitaj de la sama lingvo - Nederlando kaj Belgio, Ziko pri Vikipedio kaj Ugo kun Susanna pri Armenio. Kiel en IKU-AIS, fine de ĉiuj IVU-kursoj estos ebleco ekzameniĝi kaj akiri AIS-atestojn. *Amri Wandel (rektoro)*

Prof. d-ro Amri Wandel (Israelo)

IVU-5 PRELEGO

» Novaj planedoj kaj sunsistemoj «

Ĝis la 90aj jaroj ni ne sciis ĉu la foraj steloj (sunoj) havas planedajn sistemojn similajn al nia sun-sistemo. Pro la grandegaj distancoj estis ne eble malkovri tiajn planedojn. Nur en 1995 oni malkovris la unuan ekster-sunsisteman planedon (eksoplanedo), kaj komence de la 2000aj jaroj oni komencis malkovri multajn tiajn planedojn. Ĝis antaŭ unu jaro oni trovis centojn da ekso-planedoj, sed preskau ĉiuj gasaj gigantoj, similaj al Jupitero, kaj ne taŭgaj por vivo kiel la nia. Antaŭ unu jaro ĉio ŝanĝiĝis. Komence de 2011 la astronomoj publikigis la unuajn rezultojn de la spac-teleskopo "Kepler", dediĉita al serĉado de ekso-planedoj per nova metodo, kaj ene de nur kelkaj monatoj ĝi malkovris pli ol mil kandidatojn de ekso-planedoj, la plimulto de ili similaj al Tero. Tio estas la plej signifa paŝo en la direkton de ekstertera civilizacioj.



Amri estas profesoro pri astrofiziko en la universitato de Jerusalemo. Du tagojn antaŭ la IF-komenco li gvidis sesion pri la sama temo en la jarkunveno de ILASOL (Israela asocio pri Astrobiologio kaj Origino de Vivo), kiel membro de ĝia scienca komisiono (vd. sub http://www.ilasol.org.il/uploads/files/ILASOL2011-Schedule-241111.pdf). *2 x 90 min.*

D-ro Ziko van Dijk (Nederlando)

IVU-5 PRELEGO

Historio de enciklopedioj / Historio kaj fono de Vikipedio

Unua prelego: La historio de enciklopedioj estas komplika, ĉar la historioj de la termino kaj de la literatura ĝenro ne iris paralele. Laŭ vasta interpreto, la enciklopedioj havas aĝon de pli ol du mil jaroj, kaj ili aperis en multaj diversaj vestaĵoj.

Dua prelego: La libera Vikipedio estas multlingva enciklopedio 'libera'. Tiu vorto 'libera' ofte ne estas bone komprenata. Malantaŭ ĝi kaŝiĝas speciala koncepto, kiu ebligas la kunlaboron. *2 x 90 min.*

Ziko, germano loĝanta en NL, doktoriĝis pri la historio de Esperanto, ekde 2011 prezidanto de Vikimedio Nederlando.

IVU-5 PRELEGO

Kristin Tytgat (Belgio)

» Du popoloj disigitaj de la sama lingvo «

Nederlando kaj Belgio estas en multaj aspektoj tre proksimaj landoj sed samtempe ili estas ankaù tre malsamaj. La geografia distanco inter la du landoj estas ege malgranda sed la mondo aspektas alia se vi vojaĝas de unu lando al la alia. Nederlandanoj kaj flandroj oficiale parolas la saman lingvon sed eble ili ne komprenas unu la alian. Ni esploros en la prelego la historiajn kaj kulturajn kialojn de tiu ĉi situacio. Ni pritraktos dek nederlandajn miskomprenojn pri Belgio kaj provos klarigi ilin. Venu mult-nombre al tiu ĉi prelego por malkovri la enigmojn inter tiuj najbaroj. Poste vi havos la eblecon ekzameniĝi por la Internacia Vintra Universitato (IVU). *1 x 90 min.*

Kristin instruas la germanan kaj nederlandan lingvojn en la instituto por tradukistoj kaj interpretistoj de la Libera Universitato de Bruselo/Belgio.

IVU-5 PRELEGO

D-rino Susanna Baghdasaryan (Armenio)

» La armena skribaro ekde 5-a jarcento ĝis niaj tagoj «

En Armenio estas eksterordinara kolekto de pli ol 17.500 netakseblaj antikvaj manuskriptoj kaj ĉ. 300.000 arkiv-dokumentoj, kiuj konserviĝas en Matenadaran, libro-deponejo, kie samloke funkcias sciencesplora instituto de la antikvaj manuskriptoj. Konserviĝas ankaŭ arabaj, persaj, grekaj, asiriaj, latinaj, etiopiaj, hindaj, japanaj kaj alilingvaj manuskriptoj. Matendaran troviĝas en la listo de tutmondaj heredaĵoj de Unesko. En 2012 estos la 500-jara datreveno de la armena presita libro. Unesko proklamis Yerevan kiel internacian ĉefurbon de la libro.

1 x 90 min.

IVU-5 PRELEGO

Ugo de Riu kaj Annarosa Andrei (Italio)

» Armenio, reva lando duon-Eŭropa, duon-Azia «

La unua kongreso de Armena Esperanto Asocio estis bona ŝanco por esplori la aparte belan landon Armenio: tre antikva, tre ligita al siaj tradicioj, sed samtempe tre verva kaj evoluinta. Ĝi situas sur pluraj jarmilaj komercaj vojoj, je la limo de eksa Sovetunio, je la limo inter kristanismo kaj islamo, inter Eŭropo kaj Azio; eble Edeno estis tie ... Ugo kaj Annarosa longe vojaĝis tra la lando kaj montros la kondiĉojn, okazaĵojn kaj malkovrojn. *1 x 90 min.*

NIA KADRA TEMO: BENELUKSO

Estis foje tri landetoj, kiuj sentis sin tro etaj vidalvide la grandajn apudajn landojn, kaj decidis kuniĝi ... La tri najbaraj reĝlandoj donis komencon de siaj nomoj - por krei la unuiĝon: Belgio povus doni 'bel-', tamen nur 'be-' restis, Nederlando jesis pri 'ne-' kaj restis al Luksemburgo la 'lukso'. Tiel naskiĝis 'Be-ne-lukso'. Fakte jam antaŭe en 1921 du el la landetoj subskribis traktaton, tiel kreante la ekonomian unuiĝon belga-luksemburgan; la ekonomiaj limoj estis forigitaj kaj la monunuoj (belga franko kaj luksemburga franko) estis fikse ligitaj kun sama valoro. Nur en 1944, fine de la dua mondmilito, Nederlando, Belgio kaj Luksemburgio konsentis pri forigo de la doganpagoj ĉe siaj landlimoj kaj pri komuna impostado de varoj venintaj de ekster Benelukso. La Beneluksa Dogana Unio ekde 1960 plivastiĝis al Beneluksa Ekonomia Unio, kaj poste la koncepto Benelukso ekhavis ankoraŭ pli vastan sencon. En 2004 oni subskribis novan traktaton rilate la kompetentecon de polico dum limtransira batalado kontraŭ krimoj. Novaĵo estas ke policanoj nelimigite kaj sen antaŭa permeso rajtas vojaĝi, aresti kaj porti armilojn interne de Benelukso. Eble nun oni malpli rimarkas la apartecon de Benelukso, ĉar ĝi integriĝis intertempe en EKKŜ (komence 6-landa unuiĝo pri karbo kaj ŝtalo), kiu iom post iom evoluis al la t.n. Komuna Merkato (EEK), kaj nun al Eŭropa Unio, kiu daŭre plivastiĝas. Kaj tamen, kiel dirite estas ankoraŭ leĝoj internaj al Benelukso, kiuj ne estas komunaj al la aliaj landoj de EU. Sed ĉu Benelukso estas io pli, io alia, ol ekonomia unuiĝo? Ĉu ĝi havas ankaŭ komunajn kulturajn valorojn? Ĉu similajn vivmanierojn? Ĉu pli da kultura diverseco inter la landetoj ol da simileco? Por informiĝi kaj debati pri tio venu al la forumo kaj al la pritemaj prelegoj. Bonvenon!

Claude Nourmont

Detalojn pri nia programo vidu en la subpaĝo "Programo"

Resumojn de pluraj el la kontribuoj vidu en la subpaĝo "Resumoj"

IF - via jarfina aranĝo
internacia - renoma - alloga